

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 37. Junio 25, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbello Koffi.

Pezo: Word, nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF:383 KB. PDF al kroĉaĵo Aruŝa: 238 KB. Alkroĉaĵo AMO 100,101 KB, Sume: 762 KB.

temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipite koneblaj.

AMO 100 – bonkvalita enhavo

En EKO 36 ni raportis koncize pri la realigo de la centa seminario de AMO. Ni promesis aperigon de la enhavo pli detale. Jen ni plenumas la promeson. Vidu la alkroĉaĵon kiu prezentas la diskutojn kaj la rekomendojn el la kvin temoj preparitaj de la seminario. Jen resumo pri la mirinda progreso de la AMO programo de 2014 ĝis 2023 en 40 landoj kun alfabeto ordigo de la landoj kaj indiko pri la jaroj:

Barato (2017,2018), Brazilo (2014, 2015, 2016), Burundo (2018, 2019), Ĉeĥio (2023), Ĉinio (2014, 2020,2021, 2022), Danlando (2016), Francio (2015, 2017 (2), 2020, 2022), Germanio (2014, 2015, 2017), Hispanio (2016, 2017, 2018), Hungario (2014, 2017, 2023), Indonezio (2016), Irano (2019, 2020), Israelo (2022), Italio (2014, 2015, 2016, 2017, 2023), Japanio (2022), Kanado (2014), Kartvelio (2017), Kongo DR (2015), Koreio (2017), Kroatio (2022 (2), 2023), Kubo (2015, 2018), Latvio (2023), Litovio (2022), Maroko (2018), Nepalo (2016), Norvegio (2020), Nov-Zelando (2020), Pollando (2016, 2017, 2018, 2019, 2020, 2022), Portugalio (2018), Rumanio (2018, 2019), Rusio (2017, 2018, 2019), Senegalio (2022), Serbio (2019), Slovakio (2014, 2016 (2), 2020), Svedio (2015), Svislando (2017), Tanzanio (2016), Togolando (2014), Turkio (2014, 2016), Ukrainio (2018, 2019), Usono (2015, 2016, 2017, 2018 (2), 2019), Vjetnamio (2019).

IKEF ĉiudimanĉe rete kunsidas: aktualaj temoj

Temoj por lastatempaj kunsidoj: Komerco kaj investado; Merkatiko; Banka-financa ekonomiko; Blokĉena teknologio kaj hejmpaĝo; Komerca aspekto de arto kaj kulturo; Turismo kaj entreprenaj ekskursoj; Jurkonsilado kaj tradukservo en



entrepreno; Ekonomia terminologio; Verkado kaj Libro servo en ekonomiko; Komerca Esperanto-marko (ankaŭ moner- kaj monbilet-kolektantoj); Ĵurnalismo pri komerco kaj ekonomio; Jurscienco pri komerco kaj ekonomio; Esplorado pri borsaj transakcioj; Kunlaborado de entreprenaj organizoj (ĝemeliĝo).

IKEF (komercistoj) havas sekvantojn en ĉiu kontinento: “Mia nomo estas s-ro Gendo Francis, en Tanzanio (TZ). Mi estas membro de la loka organiza komitato por UK 2024 - (LKK). Mi estas membro de IKEF-Tanzanio. Mi esploris la esperantajn turismajn vojaĝantojn vizitantajn Tanzanion kaj apudajn lokojn tial elpensis komercan proponon kun celoj:

1. Kunordigi, plani kaj rezervi esperantan turiston aspirantan viziti Tanzanion.
2. Krei laborŝancon por esperanto-parolantoj en TZ ekesti turismaj gvidantoj.
3. Plialtigi esperantlingvan scipovon en Tanzanio.

Preparoj por UK en Aruŝa

Anoj el tri landoj kunvenis kaj diskutis, sub la gvido de d-ro Francesco Maurelli meze de junio. Legu informojn kaj vidu bildojn en la alkroĉita sveltigita PDF (238 KB).

Danuba tajdo daŭre ondas

Okazis en la 17-a de junio 2023 la monata kunveno de esperantistoj en balkanaj landoj per Zoom. Ĉeestis la sekvaj homoj, kies landoj aperas per landkodoj:

Adriana Dolca (RO), Aranka Laslo (RS), Aurora Bute (RO), Bardhyl Selimi (AL), Danijela Petrović, Dragan Stoković (HR), Gradimir Kragić (BA), Istvan Szaboles (HU), Marija Jerković (HR), Miloš Enobrnja, Nedeljka Ložaji (RS), Petronela Birte (RO), Radojica Petrović (RS), Renato Corsetti (GB).

Oni diskutis pri informado al ne-esperantistoj. Ne estis grandaj kampanjoj, sed agadoj kiel ekspozicio, intervjuo en televido, artikoloj en provincaj gazetoj. Finiĝis la kursoj en Rumanio kaj oni pretiĝas por novaj kursoj en la venonta jaro. Same en Serbio, kiu elstaras pro siaj kursoj diversnivelaj. Notindas, ke kvar junaj jamaj kursanoj eniris la estraron de la serba organizaĵo. Temas pri brila ekzemplo de rejuniĝo. Instrua agado okazas en Kroatio kaj en Hungario, sed ankoraŭ ne en la kadro de la landa asocio. Balkana kultura kurso pri la historio de Esperanto komenciĝos en la aŭtuno; gvidos ĝin rete Zlaoje Martinov.

Prelegis Bardhyl Selimi pri la historio kaj la nuntempo de la Esperanto-movado en Albanio, kie okazis granda traduka kaj eldona agado, ekzistas asocio leĝe agnoskata, sed mankas junaj aktivuloj ankaŭ pro la elmigrado lastatempa.

Organizado de kursoj retaj aŭ ĉeestaj estas la granda defio. Post la reorganiziĝo de la greka Movado, kiu ĝisdatigis sian retan paĝaron kaj kunordigas multajn lernajn agadojn pere de ret-listo, nun venis signaloj. Venis ankaŭ el Bosnio, kiu proponis nomumi observanton en la Komitato de UEA.

La 81-a Esperanto-Sumoo

Tio okazis en la dua duono de majo. Nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

1. Partoprenantoj: 297 el 35 landoj+ 1 regiono

Januaro 2023: 317 el 33 landoj + unu regiono; Marto: 318 el 36 lando, Majo 297 el 35 landoj + unu regiono

Hori Jasuo

Junularo en Nov-Zelando

La Universitato de Aŭklando ŝajnas esti la centro en kiu nova ordo de junuloj en Nov-Zelando agas.

SMG ege interesiĝas, ĉar li kun tri aliaj starigis la junularan asocion EJANZ, kiu iĝis la landa sekcio de TEJO. Tio okazis en 1969-72. La junulara sekcio sukcesis transiri de la unua ĝis la dua generacio, kaj pluaktivis ĝis 1975. Sed ne aperis la tria generacio.

Pliaj informoj: <https://linktree/ALEJeo>

Sed por vidi tion vi devas esti membro de EE.



Laŭlum en la memoro

En la 10-a de junio okazis en Pekino la memor-kunveno por 100-a datreveno de la naskiĝo de ĉina veterana esperantisto Laŭlum (Li Shijun 李士俊) en la konstruaĵo de la Ĉina Internacia Komunikita Grupo (ĈIKG). Ankaŭ viziteblas la kunveno per la apo Tencent, kaj entute pli ol 80 homoj partoprenis en la evento eksterrete kaj rete. En la kunveno debutis la libroj *Kurso pri la Traduka Arto de Esperanto kaj Promeno tra l'Esperanta Literaturo* de Laŭlum, eldonitaj de la eldonejo Sinolingua.

Pli da informoj: http://espero.chinareports.org.cn/2023-06/10/content_86956493.htm



15 ĉinaj amaskomunikiloj raportas la kunvenon:

Ĉina Esperanto-Ligo

https://mp.weixin.qq.com/s/93kT7K-s_BjPPzt9Xo7pQ

El Popola Ĉinio

http://espero.chinareports.org.cn/2023-06/10/content_86956493.htm

La Ĉina Novaĵo-Servo

<https://m.chinanews.com/wap/detail/chs/zw/10023308.shtml>

La Ĵurnalo Guangming

<https://app.gmdaily.cn/as/opened/n/334cf2717ed0424fbb0efc22abd259c3>

...kaj multaj pliaj.

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo; (<https://www.chinaesperantoligo.com.cn/>)

Tel: 86 10 68996130 ; 13126784506; Adr. P.O.Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

Senegalaj junuloj ekhavas propran organizon

Formale deklarite la 17-an de januaro 2023, la asocio de junaj senegalaj esperantistoj (SEJ) estis oficiale agnoskita de la publikaj instancoj kiel popoleduka asocio laboranta por disvastigi la internacian lingvon Esperanto en Senegalio. Tiu atingo estas frukto de diligentaj laboroj de la nova estraro, sub la gvido de ĝia prezidanto Cheikh Ahmadou Bamba DIAW. Li elektiĝis por prezidi la junularan sekcion de TEJO en Senegalio por unujara mandato renovigebla, fine de ĝenerala


assembleo, la 28-an de decembro 2022 en Tieso. Cheikh Ahmadou gvidas 8-personan estraron (el kiu 4 estas virinoj), kies misio estas starigi agadkalendaron pri informado kaj edukado rilate al Esperanto en lernejoj kaj en organizitaj grupoj.

La estraro havas ankaŭ la taskon instigi la senegalajn esperantistojn kuniĝi por revigligi la nacian movadon. La estrarano de UEA pri Afriko, s-ro Jérémie Sabiyumva, salutis la volon de junaj esperantistoj en Senegalo kunlabori por plifortigi la enlandan asocian agadon kaj levi ĝian prestiĝon. Li instigis la estraron de SEJ atingi la celojn fiksitajn por tiu ĉi nova mandato kaj certigis pri la disponeblo de la estraro de UEA.

. Sendis: Adjévi Adjé

Madagaskaro perdis elstaran aganton

RALALARISOA Justine (Lala), ekskomitatano de Universala Esperanto-Asocio, post mallonga malsano, forpasis la 20-an de majo 2023. Ŝi naskiĝis en 1954, kaj profesie estis instruistino ĝis emeritiĝo. Lala en sia vivo ankaŭ aktivis en la Esperanto-movado ĝenerale kaj aparte en la kontinenta nivelo. Ŝi estis membro de la Afrika Komisiono kaj laste, antaŭ sia morto, ŝi ege helpis en eduka agadkampo por apero de junaj novaj fortoj en Madagaskaro. Ŝi estis ankaŭ fakdeligito de UEA kaj inter 1998 kaj 2019 vojaĝis unufoje jare kaj partoprenis al pluraj kunvenoj pri Esperanto en Francio kaj en Eŭropo. Pro siaj meritoj al la Esperanto-movado, RALALARISOA Justine (Lala) restas en memoro de pli ol unu esperantisto.



Sendis Adjévi Adjé

Plia forpaso frapas Italion kaj Brazilon

La 10-an de junio 2023 je sia 93-a vivojaro forpasis **Giuseppe Grattapaglia** (1931-2023), itala inĝeniero, rotariano kaj esperantisto, ekde 1974 loĝinta en Brazilo. Legu la nekrologon en la retejo *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/2023/06/nekrologo-69/> Kaj en Esperanto facila: <https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/forpasis-giuseppe-grattapaglia-r371/>



mga

===== vortoj 1175 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>: La kolekto de EKO:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 30.).

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.